
# tejo:aktuale

n°508 | Septembro 2025

**Finiĝas nia volontulado.** Ni dankas al vi ĉiuj por ĉi-monate denove legi nian laboron kaj ĝisas vin. Sed ne timu, venos novaj volontuloj, kiuj volonte informos vin pri la aktualaĵoj de la Esperanto-mondo kaj pri TEJO. Do... legu tiun ĉi numeron de **TEJO-aktuale** kaj eku novan volontulan jaron kun bona sento! Bonŝancon al la sekvaj volontuloj!

## ALVOKOJ




### TEJO kaj Civiencia invitas vin partopreni en scienca esploro pri sintenoj al lingva justeco

La celo estas kompreni lingvajn identecojn kaj esprimiĝojn, inkluzivecon, perceptojn pri nuna stato de lingva (mal)justeco kaj dezirojn pri monda lingva stato. Vi povas helpi en la kolektado de datumoj por la esploro plenigante la enketilon **"Mia lingvo"** en la programo Konuvin.




### Kontakto bezonas provlegantojn!

Via kaŝita talento estas trovi mistajpojn, gramatikajn kaj ĉiajn erarojn.
Ni havas bonan novaĵon por vi!
Ni serĉas provlegantojn por nia revuo Kontakto. Por ke la revuo estu ĉiam altkvalita, **ni bezonas vian helpon**.

Se vi interesiĝas, skribu al kontakto@tejo.org kun informoj pri via tempodisponeblo por la laboro.




### Kandidatiĝu kaj iĝu la gastlando de la 83-a IJK en 2027

Anoncu vian intereson laŭeble plej frue aŭ sendu viajn demandojn skribe al

oficejo@tejo.org kaj ni laŭeble helpos vin pri via kandidatiĝo. Sendu vian plenigitan kandidatiĝon **ĝis la 16-a de januaro 2026**. Pliajn detalojn vi povas legi en nia retpaĝo.




### Iĝu Komitatano C de TEJO

Ni bonvenigas kandidatiĝojn por la Komitatano C de TEJO, kiu oficos ekde la 1-a de decembro 2025 ĝis la 30-a de novembro 2027.

La Komitatano C en la Komitato, la supera organo de TEJO, reprezentas la membrojn de la kategorio **Junaj Amikoj de Esperanto**.
Legu la plenan alvokon kaj kandidatiĝu **ĝis la 31-a de oktobro 2025**.

---

## ANONCOJ




### Nova estraro!

La Komitato elektis la Estraron de TEJO por la **mandato 2025-2026**. La nova teamo ekoficis la 1-an de septembro. Sukceson! 💚💚💚

Prezidantino: Ana Ribeiro
Vicprezidanto: Ikvero Almeida Silva
Ĝenerala Sekretario: Snehaja Venkatesh
Kasisto: Mihary Andrianirina
Estrarano: Alexandre Basque
Estrarano: Espoir Ngoma Kasati

---

## EVENTOJ




### IJK venontjare en KATALUNIO

IJK okazos de la **9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026**, en kongresejo apartenanta al la urbeto Tiana, tre proksima al la ĉefurbo de Katalunio, Barcelono. 💛❤️

🌞 IJK 2026 estos speciala ankaŭ pro unika sperto kiun ĝi proponos al ni: la 12-an de aŭgusto vespere oni povos spekti plenan suneklipson, kiu videblos preskaŭ nur en Iberio.

📍 Rezervu la datojn kaj restu atenta pri novaĵoj, ĉar baldaŭ aperos la aliĝilo kaj aliaj informoj.📅




## Venu al KKPS, por klaĉoj, ludoj kaj etoso! 🐥

**De la 28-a ĝis la 30-a de novembro** okazos la aŭtuna semajnfina renkontiĝo de NEJ. Ĉi-jare ĝi okazos en Gemert, en la sudo de Nederlando, proksime al la germana kaj belga landlimoj.
Ĝueblos ludoj, ĝisnokta babilado, trinkejo, koncertoj kaj kostuma balo. 💃🎩

Ne estu koko, venu al KKPS!

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**




Oktobro estas la sezono, kiam la kongresaj memoroj fandiĝas en retaj dramoj, sed ankaŭ en belaj novaj ideoj. Se vi sukcesos uzi vian energion por ridi prefere ol kvereli, vi jam gajnis la plej gravan batalegon.




♈ Vi eniras oktobron kun la sama impeto, kiel dum via unua IJK. Ĉiu Telegram-diskuto estas por vi batalo, ĉiu retmesaĝlisto – ŝanco por montri, ke via opinio estas la ĝusta. La steloj avertas: ne ĉiuj deziras dupaĝan klarigon pri akuzativo. Sed vi sendos ĝin ĉiuokaze, ĉu ne?




♉ Vi sopiras al trankvilo, sed la movado neniam dormas. Ĉi-monate oni petos vin "nur kontroli buĝeton", kio poste signifos tri semajnojn de kalkulado. Bonŝance via obstina naturo savos la tagon. Sed vere, se iu denove proponas "alternativan kongreson", vi havas plenan rajton fermi la babilejon.




♊ Oktobro vekas en vi la deziron esti ĉie samtempe. Vi partoprenos kvin retajn eventojn en unu semajnfino, kaj poste vi raportos en ses malsamaj forumoj pri la "futuro de la movado". La problemo? Vi neniam memoras, kion vi promesis al kiu. La solvo? Faru propran podkaston kaj nomu

ĝin *miaj kontraŭdiroj*.




♋ Via emocia energio estas alta. Vi sentas vin respondeca pri la bonfarto de ĉiuj en via loka klubo – eĉ tiu ulo, kiu neniam pagas kotizon, sed ĉiam volas pli da kafo. Konsilo: vi ne estas la patr(in)o de la movado. Eĉ se ĉiuj kondutas kvazaŭ vi estus.




♌ Atento revenas al vi! Ĉi-monate vi havas la ŝancon fariĝi la stelo de la loka renkontiĝo, nur per via kapablo rakonti la saman anekdoton pri Zamenhof trifoje sen eraroj. La steloj tamen konsilas: foje lasu spacon ankaŭ al la aliaj. Jes, eĉ al tiu, kiu parolas tro mallaŭte tra la mikrofono.




♍ Vi volas ordigi la tutan retan arkivon de via asocio. Kaj vi faros tion. Kun kvar niveloj de dosierujo-strukturo kaj ŝlosita Google-folio. Ĉi-monate vi sentos vin kvazaŭ vi savas la civilizon. Kaj eble vi vere savas ĝin – almenaŭ de perdo de la pasintjara protokolo.




♎Feliĉan naskiĝmonaton, Pesilo! Vi kutime estas la mediacianto, sed ĉi-monate vi surprizos ĉiujn: vi diros *"sufiĉe!"* dum retkverelo pri -iĉ-. La plumba silento kiu sekvos estos pli dolĉa ol ajna koncerto de JoMo. Ĝuu tiun momenton de pura potenco.




♏ Oktobro vekas vian konspiraman flankon. Vi certas, ke estas sekretaj grupetoj, kiuj regas la movadon. Kaj rigardante la Verdajn Skoltojn eble vi pravas. Sed ĉu vere necesas skribi 12-paĝan eseon pri tio? Jes, se vi volas. La steloj tamen sugestas: tenu iom da mistero. Homoj timas vin pli, kiam ili ne scias, ĉu vi ŝercas.




♐ Vi ankoraŭ sopiras vojaĝi, eĉ se nun via sola vojo kondukas al la kuirejo. Sed via spirito restas libera. Ĉi-monate vi povus hazarde aliĝi al malproksima eventeto nur ĉar vi vidis afiŝon kun stelo. Ĉu racia? Tute ne. Ĉu memorinda? Sendube.




♑ Vi provas teni la aferojn kune – kaj ĉiuj scias, ke sen vi la movado disfalus. Problemo: vi ankaŭ scias tion. Ĉi-monate via defio estas lasi iun alian preni respondecon, eĉ se ili faros tion malpli perfekte. Jes, vi povas. Kaj jes, vi travivos.

♒ Vi elpensas novan platformon por Esperanto, ĉi-foje kun blokĉeno, AR, kaj memfaritaj memeoj. Iuj diras, ke tio estas freneza. Vi nomas tion "nova epoko". Ĉu ĝi funkcios? Verŝajne ne. Ĉu ĝi kreos miton




pri vi? Jes. Kaj tio ja sufiĉas por valori la penon.




♓ Vi sentas vin tre poezia ĉi-monate. Eble tro. Vi povos skribi 17 versojn pri la stelo en la flago kaj plori dum vi legas ilin laŭte. Homoj aŭ ridetos, aŭ ankaŭ ploros. Kaj jen via superpotenco: vi memorigas ĉiujn, kial ili ankoraŭ venas al renkontiĝoj malgraŭ la konstanta retbruo.

---




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-Volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?*    unsubscribe from this list    update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands